

International Society for Language Studies Conference
Konferencio de la Internacia Societo por Lingvaj Studoj

June 11-13, 2009 | La 11-an – 13-an de junio, 2009
Orlando, Florida | Orlando, Florida

Session I: Interlinguistics and Esperantology
Sesio I: Interlingvistiko kaj Esperantologio

The international language Esperanto as a linguistic and social phenomenon

Humphrey Tonkin
University Professor of the Humanities
University of Hartford

Abstract

A conversation in the international language Esperanto looks and sounds much like a conversation in any other language. It is based on over 100 years of usage and it may be about any conceivable topic. Esperanto fits most definitions of what constitutes a language. The creator of Esperanto, Zamenhof, saw language as a process – ever changing, and belonging to a community, and thus a social phenomenon. Esperanto speakers took charge of Esperanto early on, turning it from a linguistic project into the idiom of a full-fledged speech community. It is often argued that Esperanto is “not natural,” but the term “natural,” when applied to language, is always a metaphor: language is natural to the extent that it is used for all purposes by its speakers. Languages are shaped by art and by play, which lead inevitably to the emergence of a distinctive culture. Esperanto came into being amid the optimism of the late 19th century, but its ideology has evolved with its speakers and the language has grown and expanded. It is emphatically not the domain of language freaks. Indeed it fits with the timeless human aspiration, led by the poets, to make language ever more responsive to human needs.

La internacia lingvo Esperanto kiel lingva kaj socia fenomeno

Humphrey Tonkin
Profesoro pri Humanecaj Studoj
Universitato de Hartfordo

Resumo

Konversacio en la internacia lingvo Esperanto aspektas kaj sonas esence simila al konversacio en kiu ajn alia lingvo. Ĝi estas bazita sur pli ol cent jaroj da uzado kaj povus pritrakti kiun ajn temon. Esperanto akordiĝas kun plejparte ĉiuj difinoj de tio, kio konsistigas lingvon. La kreinto de Esperanto, Zamenhof, konsideris la fenomenon lingvo

kiel procedon – daŭre ŝanĝiĝantan, kaj apartenantan al specifa komunumo, kaj sekve socia fenomeno. Esperanto-parolantoj frue transprenis respondecon pri Esperanto, transformante ĝin el lingvoprojekto al idiomato de plenrajta parolkomunumo. Oni ofte argumentas, ke Esperanto estas “ne natura,” sed la termino “natura,” se aplikata al lingvo, estas ĉiam metafora: lingvo estas natura nur en tio, ke ĝi estas uzata por ĉiuj celoj fare de sia parolantaro. Lingvoj estas formataj per arto kaj per ludado, kiuj neeviteble kondukas al ekapero de unika kulturo. Esperanto ekestis en la optimismo de la malfrua deknaŭa jarcento, sed ĝia ideologio evoluis tra la jaroj pere de ĝiaj parolantoj, kaj la lingvo kreskis kaj ekspansiis. Emfazindas, ke ĝi ne estas teritorio de lingvofanatikuloj. Verdire, ĝi kongruas kun la eterna homa aspiro, gvidata de la poetoj, fari la lingvojn daŭre pli respondaj al homaj bezonoj.

Should language scholars pay attention to Esperanto?

Grant Goodall

Professor of Linguistics

University of California, San Diego

Abstract

For most of the last 50 years, Esperanto as a language and as a phenomenon has been largely ignored by language scholars writing in English. I argue here that this lack of attention needs to be reversed, as there are at least two general areas where Esperanto could potentially offer new insight into questions of current interest.

The first area concerns the relation between the grammatical properties of a language and its role in society. The advent of Esperanto and several competitors in the late 19th century and their varying fates over the next several decades offer a fascinating case study in this area, and there are tantalizing instances where it does appear that a given language's grammatical properties and social role were closely linked.

Another area is language acquisition and here too there are intriguing questions that have not yet been explored in depth. How does 1st-language acquisition of Esperanto proceed, given that the only source of input is typically the parents, who are themselves non-native speakers of the language? And what about 2nd-language acquisition, where learners again mainly rely on other 2nd-language learners for input, despite the inconsistent and error-prone nature of this input? Is successful language acquisition possible under these circumstances, and if so, why?

Exploring either of these areas further could provide insights not only into Esperanto itself, but also into much larger questions of general linguistic interest.

Ĉu lingvistoj priatentu Esperanton?

Grant Goodall

Profesoro de Lingvistiko

Universitato de Kalifornio, San Diego

Resumo

Dum la lastaj 50 jaroj, anglalingvaj lingvistoj plejparte ignoras Esperanton kiel lingvon kaj kiel fenomenon. Mi argumentas ke oni devas ŝanĝi tiun mankon de priatento, pro tio ke estas almenaŭ du ĝeneralaj kampoj en kiu Esperanto povus ĵeti iom da lumo sur nuntempajn demandojn.

La unua kampo koncernas la rilaton inter la gramatikaj trajtoj de lingvo kaj ĝia rolo en la socio. La alveno de Esperanto kaj plural konkurantoj malfrue en la 19a jarcento kaj ties malsamaj sortoj en postaj jardekoj prezentas ege interesan studkampon, kaj estas pluraj pripensindaj kazoj en kiuj ja ŝajnas ke estis forta ligo inter la gramatikaj trajtoj de iu lingvo kaj ĝia socia rolo.

La dua kampo estas la lingvoakirado, kaj ankaŭ en ĉi tiu kazo estas pensigaj demandoj kiujn oni ĝis nun ne funde esploras. Kiel oni akiras Esperanton kiel la unuan lingvon se la sola fonto de lingvaĵo por la infano ofte estas la gepatroj, kiuj ne estas denaskaj parolantoj de la lingvo? Kaj kion pri la akirado de Esperanto kiel dua lingvo? En tiu kazo denove la akirantoj devas plejparte utiligi nedenskajn parolantojn kiel fonton de lingvaĵo, malgrau la nekonstanta kaj kelkfoje erarplena karaktero de tiu lingvaĵo. Ĉu sukcesa lingvoakirado eblas en tiuj cirkonstancoj, kaj se jes, kial?

Pli intensa esplorado en tiuj kampoj povus plibonigi niajn sciojn ne nur pri Esperanto mem, sed ankaŭ pri pli vastaj demandoj en la lingvistiko ĝenerale.

Session II: Esperanto and Education

Sesio II: Esperanto kaj Edukado

Esperanto and foreign language education: Language advocacy vs. language territorialism

Bonnie Fonseca-Greber

Assistant Professor, Classical and Modern Languages

University of Louisville

Abstract

From the perspective of linguistic legitimacy (Reagan & Osborn, 2002), the proposed session critiques the field of foreign language education through a case study of the ACTFL-sponsored Esperanto Standards writing and dissemination process, in which the presenter participated as a foreign language educator.

Despite initial funding and participation from the ACTFL leadership, ultimately the *Student Standards for Learning Esperanto K-16 in the United States* (2005), written the same summer as the Arabic Standards and both fully aligned with the *Standards for Foreign Language Learning in the 21st Century* (NSFLEP, 1999), did not appear in the 3rd Edition of the *SFLL*.

It is argued that this sudden policy reversal results from the foreign language education profession's attempts to delegitimize Esperanto as a language out of a sense of linguistic territorialism, where the acceptance of a language known for its ease of acquisition (Maxwell, 1988) and pedagogical and propaedeutic effects facilitating the acquisition of additional languages (Fantini & Reagan, 1992; Sherwood, 1982, 1983), could be perceived as a threat to the study (enrollment) of the language one teaches, particularly in the case of LLCTLs.

Thus, the foreign language education profession itself fails to meet its own ACTFL/NCATE (2002) *Standard 6.b. Knowing the Value of Foreign Language Learning*. Rather than advocating for language study broadly, the field fragments into narrow provincialism advocating for the study of one's own language at the expense of others, as individual languages seek to defend their territory in the curriculum.

Esperanto kaj fremdlingva edukado: Agademeco lingva aŭ teritoremeco lingva

Bonnie Fonseca-Greber

Asistantina Profesoro, Klasikaj kaj Modernaj Lingvoj

Universitato de Louisville

Resumo

De la vidpunkto de legitimeco lingva (Reagan & Osborn, 2002), la sesio proponata faras kritikon de la fako de fremdlingva edukado pere de studkazo rilate al la redakto kaj disvastiĝo de la studnormoj esperantaj sponsorigitaj tra kunlaboro de ACTFL¹ kaj ESF, en kiu partoprenis la preleguntino kiel pretigistino de instruistoj de fremdaj lingvoj.

Malgraŭ financa subteno kaj partopreno estrara de ACTFL unue, la *Student Standards for Learning Esperanto K-16 in the United States* (2005), skribitaj dum la sama somero ol la arabaj studnormoj kiuj ankaŭ sekvis la ACTFL-a modelo, *Standards for Foreign Language Learning (SFLL) in the 21st Century* (NSFLEP, 1999), la esperantaj studnormoj finfine ne aperis en la tria eldono de la *SFLL*.

¹ Sigloj ĉi-ene:

ACTFL: American Council on the Teaching of Foreign Languages (Usonana Kunsido pro la Instruado de Fremdaj Lingvoj)

ESF: Esperantic Studies Foundation (Fonduso pro la Studo de Problemoj Lingvaj)

SFLL: Standards for Foreign Language Learning (Fremdlingvaj Studnormoj)

NCATE: National Council for the Accreditation of Teacher Education (Kunsido Nacia [Usonana] pro la Akreditaĵo de la Edukado de Instruistoj).

Argumentiĝos, ke tiu neatendita ŝanĝo rezultis de provo parte de la fremdlingva instruistaro de mallingviigi esperanton por protekti ilian instrukampon, ĉefe de lingvo konata pro sia facileco de akirado (Maxwell, 1988) kaj pro sia kapablo faciligi la akiradon de aliajn lingvojn (Fantini & Reagan, 1992; Sherwood, 1982, 1983). Tiuj faktoroj interpretiĝas kiel minaco al la studado (kaj do, la registradaj numeroj) de la lingvo(j) kion oni instruas, ĉefe kaze de malofte instruitaj lingvoj.

Tiel tamen, la fremdlingva instruistaro malsuksecas atingi sian propran normon: la Normo 6.b de ACTFL/NCATE *Scii la valoron de fremdlingvan akiradon*. Kiel tiu studkazo montras, anstataŭ agadi fervore pro la lingvo akirado ĝenerale, la instruistaro disiĝas laŭlingve kaj luktas nur pro la studado de sia propra lingvo pro protekti sian teritorion, kaj do sian postenon.

Teaching Esperanto as subversive pedagogy

Timothy Reagan

Professor of Education

Central Connecticut State University

Abstract

Unlike in areas such as TESOL, foreign language educators, especially in the U.S., have remained largely disconnected from critical pedagogy. As Lourdes Ortega has noted, “The field of foreign language teaching [has failed] to recognize the fact that both societal attitudes towards languages and power struggles resulting from ownership of a language and culture by particular groups are inextricably embedded in the definition of goals for language education ... Foreign language education and the foreign language teaching profession need to be reconceptualized in light of socio-cultural, political, and professional forces that affect the realities and potentials of foreign language teaching communities” (1999, p. 243). I believe that this is a key, underlying problem in foreign language education, and that it is, at root, a problem in terms of raising the language awareness of students and others. In this paper, I will explore the potential for the use of Esperanto in preparing students for future language study. My argument will be based on two related themes: the use of Esperanto in raising the language awareness (and especially the *critical* language awareness) of students, as documented in the *Springboard to Language* project currently underway in Britain, and the empirically demonstrated propaedeutic value of Esperanto in promoting further and additional language learning by students.

Instruado de Esperanto kiel subfosa pedagogio

Timothy Reagan

Profesoro de Edukado

La Ŝtata Universitato de Centra Konetikuto

Resumo

Kontraste al fakoj kiel TESOL (instruado de la angla por parolantoj de aliaj lingvoj) fremdlingvoj edukistoj, precipe en Usono, restas plejparte sensciaj rilate al kritika pedagogio. Kiel notis Lourdes Ortega, “La fako de fremdlingva instruado ne rekonis la fakton ke sociaj starpunktoj rilate lingvojn, kaj same ankaŭ potencoluktoj rezultantaj el proprieto de lingvoj kaj kulturoj fare de difinitaj grupoj, estas nemalnodeble ligitaj al la difinado de celoj por lingvoedukado ... Necesas rekoncepti fremdlingvan edukadon kaj la fakon de fremdlingva instruado surbaze de la socikulturaj, politikaj kaj profesiaj fortoj, kiuj tuŝas la realojn kaj potencialojn de fremdlingvoinstruaj komunumoj.” Mi kredas, ke, fundamente, tio konsistigas ŝlosilan problemon en fremdlingva edukado – problemon ankaŭ se temas pri klopodoj kreskigi lingvokonscion ĉe studentoj kaj aliaj. En tiu ĉi referaĵo, mi esploras la potencialon de uzado de Esperanto por pretigi studentojn por estonta lingvostudado. Mi bazos mian argumenton je du rilataj demandoj: utiligo de Esperanto en altigo de la lingvokonscio de studentoj (precipe *kritika* lingvokonscio), kiel dokumentite en la projekto *Lingvolanĉilo (Springboard to Language)*, kiu nun disvolviĝas en Britio, kaj la jam empirie prezentita propedeŭtika valoro de Esperanto por antaŭenigi plian kaj aldonan lingvolernadon ĉe studentoj.